# Esperiga Komuniko (EKO)

## pretigita de UEA kaj ILEI (Stefan MacGill, Mirejo Grosjean)

EKO 2020-05 sendita el Whangarei, Nov-Zelando la 4an de februaro.

## LA DUA BULTENO POR MONTREALO LEGEBLAS RETE

Gazetara Komuniko de UEA informas, ke la Dua Bulteno jam aperis rete, sekve eblas mendi loĝigon, ekskursojn k.s. La limdato por aliĝoj en la dua periodo estas la 31a de marto.  Iru al: https://uea.org/kongresoj por informoj, mendiloj kaj utilaj ligoj. Eblas de tie preni la Duan Bultenon en formato PDF. La retejo mencias 748 aliĝintojn el 53 landoj.

## ILEI KONGRESUMOS EN KEBEKURBO




Por informoj pri la Kongreso de ILEI en Kebekurbo, iru al: <www.ilei.info>. Troveblas tie ligo al reta aliĝilo. La favorpreza aliĝperiodo kuras ĝis la 31-a de marto. La kongreso okazos inter la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto, kun bunta programo kaj lingvokursoj en turisma kaj alloga Kebekurbo. Plej bona okazo por progresi en la lingvouzo kaj prepari sin al UK. Okazos komuna vojaĝo al Montrealo fine de la ILEI-Kongreso.

## REMEMBRIGU VIN POR 2020, POR RICEVI REVUON *ESPERANTO* SENINTERROMPE!




Fine de februaro nur tiuj, kiuj remembriĝis por 2020 havos aliron al la reta versio de la revuo, kaj nur tiuj,ricevos la presitan formon de la revuo post la februara numero. Do, zorgu, ke via realiĝo survojas!

# INTERLINGVISTIKA PLEZURO

La novaj eldonoj de IpI (Informilo por Interlingvistoj, numero 110) kaj IfI (ĝia anglalingva eldono: Information for Interlinguists, numero 10) haveblas rete:

### IpI (Esperante):
Trovu la novan numeron kaj pli fruajn numerojn ĉe: http://www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipi/

### IfI (angle):
Trovu la novan numeron kaj pli fruajn numerojn ĉe: http://www.esperantic.org/en/publications/ifi-information-for-interlinguists/

Jen resumo de la enhavo:

- Unesko kaj China Report Press plu eldonos la Unesko-kurieron en Esperanto kunlabore kun la tradukteamo de UEA.
- Konferenco de NROj alvokas plifortigon de UN okaze de la 75-a jubileo
- Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de Homrajta Tago, 10 decembro, kaj Zamenhof-Tago, 15 decembro, 2019
- Simpozio pri Lingva Diverseco kaj Daŭripova Evoluo, honore al la 75-jariĝo de Unuiĝintaj Nacioj, okazos en Montrealo, 8-10 aŭgusto 2020
- UEA festas la 60-an datrevenon de la Deklaracio de la Rajtoj de la Infano

# KULTURCENTRO GREZILJONO INVITAS

Jannick Huet Schumann kore invitas vin al la 10-a studperiodo PRINTEMPaS de la 18-a ĝis la 25-a de aprilo 2020. Sub la gvidado de kvar junaj, kompetentaj kaj spertaj instruistoj, la partoprenontoj el diversaj landoj ekzercos sin en parolkapablo.

Ekster la kursoj ili ĝuos simpatian kaj internacian etoson en trankvila natura kadro . La kastelo troviĝas en bela ĉirkaŭaĵo, en la regiono de Anĵuo, kie ne mankas ekskurso-lokoj kaj vidindaĵoj. La manĝoj estas variaj kaj bongustaj, preparitaj de profesia kuiristo. Nun, danke al la freŝdataj renovig-laboroj, la kastelo povas akcepti 60 personojn – kaj eĉ pli da gastoj en la kampadejo.



La 25-an de aprilo, post sep tagoj da intensa praktikado, la gvidantoj proponas ekzamenon en unu el la niveloj B1, B2 aŭ C1. Tiel povos la kandidatoj mezuri siajn progresojn, kaj ricevi lingvo-atestilon konforman al la normoj de la Eŭropa Konsilio (KER).
PRINTEMPaS estas la perfekta loko por “malbloki” tiujn, kiuj bezonas okazojn praktiki Esperanton, kaj akiri pli fluan kaj ĝustan parolkapablon. La tre pozitivaj opinioj,kiujn esprimis multaj partoprenintoj de la pasintaj PRINTEMPaS; tion atestas (vidu en gresillon.org/opinio).

Bonvenon en la franca Esperanto-kastelo Greziljono.
Retejo => gresillon.org/printempas ;
Kontakto => kastelo@gresillon.org, huet.jannick@gmail.com

## PLORU PRI BRITELIRO, JUBILU PRO LA EUROPA BULTENO

Jen la enhavo de la januara Eŭropa Bulteno libere legebla en la retejo de EEU:

1. Eŭropa Komisiono malfermos vastan diskutadon pri la estonto de EU
2. 100 jaroj de Litova Esperanto-Asocio
3. Prezidanto de EEU interparolis kun antaŭa ĝenerala sekretario de Eŭropa Komisiono
4. Filmeto pri Esperanto kun subtekstoj en multaj lingvoj
5. La malavantaĝoj de reta tekstkonservado
6. Festa semajno por infanoj kaj familioj en kastelo Greziljono
7. La 2-a Eŭropa civitana renkonto en Kassel

Vi povas legi la Bultenon: : https://www.europo.eu/euhropa-bulteno

590 vortoj

Komunikoj pri la komunikoj iru al: stefan.macgill<che>gmail.com.

Aldonu vin, subtrahu vin, proponu tekstojn por aperigo.